# KATALOGADO PER OPENBIBLIO

(1a eld.)

**Ana Manero**

**Hispana Esperanto-Federacio**
**Biblioteko Juan Régulo Pérez**
**2011**

# KATALOGADO PER OPENBIBLIO


KATALOGADO PER OPENBIBLIO ....... 2
Enkonduko ....... 2
Rilato inter MARC kaj ISBD ....... 3
Priskribaj kampoj ....... 3
245 ....... 4
260 ....... 4
490 ....... 4
Rubrikaj kampoj (Alirpunktoj) ....... 4
100 ....... 5
650 ....... 5
700 ....... 5
Aliaj gravaj kampoj ....... 5
Speco ....... 6
Signaturo ....... 6
Kiel katalogi per OpenBiblio ....... 6
Ekzemplera informo ....... 13
Barkodo ....... 19
Utilaj ligiloj ....... 21


## *Enkonduko*

Por bone kompreni ĉi dokumenton konsilindas unue legi la dokumenton *Ĝenerale pri katalogado*, kie ni donas minimumajn sciojn pri ĉi biblioteka tekniko.

OpenBiblio estas mastrumsistemo bazita sur MARC[1] en kiu ĉiuj areoj kaj elementoj de la ISBD[2]-normaro estas kodigitaj en difinitaj kampoj kaj subkampoj. La sistemo konsistas el kvin moduloj: *Pruntejo*, kiu permesas la administradon de uzanto-datumoj, pruntoj, rezervoj kaj redonoj; *Katalogejo*, por kontrolo de bibliografiaj rikordoj kaj ekzempleroj; *Administrejo*, kie eblas agordi kaj administri la sistemon; *Raportoj*, utila por krei raportojn pri la datumoj de la biblioteko; kaj *Retkatalogo*, kiu permesas konsulti rete la katalogon kaj tiel koni la havaĵon de la biblioteko.

Ĝi ne disponas modulon por kontrolo de aŭtoritatoj kaj tio konsistigas ties ĉefan mankon, sed malgranda biblioteko povas elturniĝi sen ĝi.

---

[1] *Machine-Readable Cataloging,* , katalogado legebla per maŝino.
[2] *International Standard Bibliographic Description*, internacia norma bibliografia priskribo.

La ĉefa modulo estas *Katalogejo*, kaj pri ties uzado temas ĉi gvidilo. En la modulo, ĉiuj areoj kaj elementoj de la ISBD-normaro aperas kodigita en difinitaj kampoj kaj subkampoj. La subkampoj aperas sendependaj kaj kaze de ilia ripetiĝo en la bibliografia rikordo, ili aperas ordigitaj ne logike sed ĉiam laŭ alfabeta ordo. Tio devigas al konscia devojiĝo de la kataloga normaro por ke la donita informo estu komprenebla en la rikordo. Ĉi tiu maniero organizi la informon neniel malhelpas la funkciadon de la sistemo kaj ĝian utilon. Simple oni devas kutimiĝi al ĝi. Vidu en la sekva punkto la ĉefajn esceptojn al la reguloj.
Se vi konas la *ISBD*-normaron kaj la *MARC*-formaton, vi povas rekte iri al la rubriko *Kiel katalogi per Openbiblio*.

## *Rilato inter MARC kaj ISBD*

### Priskribaj kampoj

| **Areo** | **Kampo** | **Subkampo** | **Openbiblia etikedo** | **Ĉe** | **Lingvo** |
|---|---|---|---|---|---|
| 1. Pri titolo kaj eldiro pri respondeco | 245 | a | Titolo | Baza slipo | Dok[3]. |
| | | b | Titol-aldono | | |
| | | c | Verkintoj | | |
| 2. Pri eldono | 250 | a | Eldono | Baza slipo | Dok. |
| 3. Pri numerado (revuoj) | 310 | a | Aperritmo | MARC-kampoj | Kat[4] . |
| | 362 | a | Aperjaroj/numerado | MARC-kampoj | Doc. |
| 4. Pri publikigo | 260 | a | Eldonloko | Baza slipo | Dok. |
| | | b | Eldoninto | | |
| | | c | Eldondato | | |
| 5. Pri priskribo | 300 | a | Amplekso (p.) | Baza slipo | Kat. |
| | | b | Aliaj detaloj (il.) | | |
| | | c | Mezuroj | | |
| | | e | Aldona materialo | | |
| 6. Pri serio | 490 | a | Serio | MARC-kampoj | Dok. |
| | | x | ISSN | | |
| | | v | Volumo/numero | | |
| 7. Pri notoj | 500 | a | Noto (ĝenerala) | MARC-kampoj | Kat. |
| | 502 | a | Disertacio | | |
| | 504 | a | Bibliografio | | |
| | 538 | a | Teknikaj datumoj | | |
| | 546 | a | Lingvo | | |
| | | b | Alfabeto | | |
| 8. Pri norma numero | 020 | a | ISBN | Baza slipo | |
| | 022 | a | ISSN | MARC-kampoj | |

3 Dok. Oni redaktas la informon de ĉi kampo en la lingvo de la dokumento.
4 Kat. Oni redaktas la informon de ĉi kampo en la lingvo de la katalogo, Esperanto niakaze.

**245**. Oni ne skribas la interpunkcion de la subkampoj 245b kaj 245c ĉar ili montriĝas sendependaj en la rikordo. Ekzemple, se laŭ ISBD la informo pri titolo kaj eldiro pri respondeco estus:

La verda insulo : romano / Augusto López

en OpenBiblio la afero estus:

245a La verda insulo
245b romano
245c Augusto López

**260**. Pro la sama kialo se la eldoninto havas sidejon en du lokoj oni notu:

260a Madrido ; Barcelono

Se estas du eldonintoj kun sidejo en la sama loko:

260a Madrid
260b Hispana Esperanto Federacio : Madrida Esperanto-Liceo

Se estas pli ol unu eldoninto kun sidejoj en malsamaj lokoj, citu nur la unuan sekvatan de [ktp.]:

260a Zaragozo [ktp.]
260b Frateco [ktp.]

**490**. La interpunkcio por serioj estas parentezoj enhavantaj la tutan priserian informon, sed ĉar la subkampoj aperas sendependaj, ni konsilas ne tajpi la parentezojn ĉar la informo havos iom strangan aspekton kaj estus verŝajne ne komprenebla. Cetere pro tiu sama kialo, se ni devas doni informon pri du serioj, ambaŭ numerigitaj, konsilindas doni la informon pri la numero en la subkampo "a" de la koncerna serio ĉar male perdiĝos la rilato inter la nomo de la serio kaj ties numero.

Ekzemple:

Se estas nur unu serio:

490a Stafeto 490v 17

Se estas du serioj:

490a Stafeto ; 23
490a Oriento kaj Okcidento ; v. 4

## Rubrikaj kampoj (Alirpunktoj)

| **Alirpunkto** | **Kampo** | **Subkampo** | **Openbiblia etikedo** | **Lokita ĉe** |
|---|---|---|---|---|
| Ĉefa (persono) | 100 | a | Aŭtoro | Baza slipo |
| Ĉefa (korporacio) | 110 | a | Korporacio | MARC-kampoj |
| Ĉefa (kongreso) | 111 | a | Kongreso | MARC-kampoj |
| Ĉefa (unueca titolo) | 130 | a | Unueca titolo | MARC-kampoj |
| Fakvortoj (persono) | 600 | a | Fakvortoj (persono) | MARC-kampoj |

| Alirpunkto | Kampo | Subkampo | Openbiblia etikedo | Lokita ĉe |
|---|---|---|---|---|
| Fakvortoj (korporacio) | 610 | a | Fakvortoj (korporacio) | MARC-kampoj |
| Fakvortoj (kongreso) | 611 | a | Fakvortoj (kongreso) | MARC-kampoj |
| Fakvortoj (unueca titolo) | 630 | a | Fakvortoj (unueca titolo) | MARC-kampoj |
| Fakvortoj (temo) | 650 | a | Fakvorto | Baza slipo |
| Fakvortoj (geografia) | 651 | a | Fakvorto (geografia nomo) | MARC-kampoj |
| Sekundara (persono) | 700 | a | Aŭtoro | MARC-kampoj |
| Sekundara (korporacio) | 710 | a | Korporacio | MARC-kampoj |
| Sekundara (kongreso) | 711 | a | Kongreso | MARC-kampoj |
| Sekundara (unueca titolo) | 730 | a | Unueca titolo | MARC-kampoj |
| Sekundara (plia titolo) | 740 | a | Analiza titolo (devus diri Plia titolo) | MARC-kampoj |
| Sekundara (indiko pri pli frua eldono, ĉefe ĉe revuoj) | 780 | t | Antaŭa titolo | MARC-kampoj |
| Sekundara (indiko pri pli malfrua eldono, ĉefe ĉe revuoj) | 785 | t | Posta titolo | MARC-kampoj |

**100**. OpenBiblio devigas ĉiam plenigi ĉi kampon, kvankam ne ĉiam pro kataloga normaro ni havas personan aŭtoron kiel ĉefan rubrikon aŭ alirpunkton . Tial oni uzu ĉi kampon por enskribi sekundaran rubrikon kiam ne estas ĉefa rubriko. Cetere, kvankam la etikedaro permesas uzi la kampojn 110, 111 kaj 130, fakte ili ne estas traserĉeblaj, tial –ja konscie kontraŭregule– ni uzas la etikedon 100 kiel kampo por ĉefrubriko ankaŭ korporacia aŭ kongresa.

**650**. Sama problemo okazas ĉe la fakvortoj, do ni metas ĉiajn en la kampo 650.


**700**. Kiel en la ĉefrubrikoj, nur la kampo 700, persona, estas traserĉebla.

## Aliaj gravaj kampoj

| Aliaj gravaj kampoj | Kampo | Subkampo | Openbiblia etikedo | Lokita ĉe |
|---|---|---|---|---|
| UDK | 080 | a | UDK | MARC-Kampoj |
| Elektronika aliro | 856 | u | URL | MARC-Kampoj |

## Speco

Openblio havas implicite liston de dokumentaj specoj kutime troviĝantaj en bibliotekoj: libroj, revuoj, sonregistroj, videoj, ktp. Eblas aldoni al ĉi listo pliajn specojn laŭnecese per la modulo Administrejo:





## Signaturo

Temas pri kodo, nepre aperinta en la registro, kiu indikas la konkretan lokon de la biblioteko kie troviĝas la originala dokumento. Ĝi aperu ankaŭ sur la dorso (spino) de la libro.


Ĝia konsisto dependas de la biblioteka speco, de la disponebla spaco kaj, ĝenerale, de organizaj postuloj. Ekzemple, hispanaj publikaj bibliotekoj utiligas sistemojn bazitajn sur UKD (Universala Dekuma Klasifiko), bibliotekoj kun malgranda disponebla spaco en siaj stokejoj preferas ordigi la dokumentojn laŭ sinsekvaj numeroj. Tiu estas la kazo de Biblioteko Juan Régulo Pérez.

## *Kiel katalogi per OpenBiblio*


Enirinte la modulon ni trovas jenan ekranon:




Ni klakas sur *Nova rikordo* kaj ni ricevas la katalogan ekranon:




Ĉar la sistemo estas adaptita al la katalogaj bezonoj kaj kutimoj de la Biblioteko de Kongreso kaj aliaj bibliotekoj, ĉefe usonaj, sekvantaj ĝiajn katalog-kutimojn, aperas implicite kelkaj kampoj uzataj de ili sed, principe, ne uzendaj niakaze:





Kiel ekzemplon, ni katalogu la verkon "Alico en Mirlando", kies ISBD-slipo estas jena:


9876
CARROLL, Lewis
Alico en Mirlando / Lewis Carroll ; tradukis el la angla lingvo Donald Broadribb ; [internaj bildoj de John Tenniel]. - 3a eld. - Kaliningrado : Sezonoj, 2004
80 p. ; il. ; 20 cm. - (Mondliteraturo ; v. 8)
Originala titolo : Alice in Wonderland
1. Infanlibroj tradukitaj. I. Broadribb, Donald, trad. II. Tenniel, John, il. III. Titolo. IV. Serio

Ni plenigas la bazan slipon per la koncernaj datumoj






kaj akceptas. Aperas tiam ĉi ekrano:





Sed mankas kelkaj informoj, kiun ni devas aldoni kreante unue la koncernan kampon. Por tio ni klakos sur *Redaktu MARC-informon*:




kaj poste sur *Aldonu novan MARC-kampon*. Aperos tiam ĉi alia ekrano:





En la formularo ni povas rekte skribi la bezonatan etikedon kaj subkampon aŭ elekti ilin el listo klakante sur *Elektu*. En ĉi lasta kazo malfermiĝas la *MARC-elektejo* kaj ni navigas en ĝi por trovi la etikedon kaj subkampojn bezonatajn. Ekzemple la etikedon 490 a por serioj:




Se ni klakas sur la koncerna butono la kampo aperos sur la formularo kaj ni povas jam skribi la informon:



Ĉiu nova aldonita etikedo enlistiĝas kaj eblas modifi aŭ forviŝi ĝin laŭbezone nur klakante sur la responda butono:


Biblioteko Juan Régulo Pérez

Aldonu novan MARC-kampon


MARC-kampoj:

MARC-kampo sukcese aldonita.


| Funkcio | | Etikedo | Etikeda priskribo | Ind 1 | Ind 2 | Subkampo | Subkampa priskribo | Datumoj |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| redaktu | forviŝu | 250 | Edition statement | N | N | a | Eldono | 3a eld. |
| redaktu | forviŝu | 260 | Publication, distribution, etc. (imprint) | N | N | a | Eldonloko | Kaliningrado |
| redaktu | forviŝu | 260 | Publication, distribution, etc. (imprint) | N | N | b | Eldoninto | Sezonoj |
| redaktu | forviŝu | 260 | Publication, distribution, etc. (imprint) | N | N | c | Eldondato | 2004 |
| redaktu | forviŝu | 300 | Physical description | N | N | a | Priskribo (Amplekso, paĝoj...) | 80 p. |
| redaktu | forviŝu | 300 | Physical description | N | N | b | Priskribo (Aliaj detaloj) | il. |
| redaktu | forviŝu | 300 | Physical description | N | N | c | Priskribo (Mezuroj) | 20 cm |
| redaktu | forviŝu | 490 | Series statement | Y | N | a | Serio | Mondliteraturo |
| redaktu | forviŝu | 490 | Series statement | Y | N | v | Volumo / numero | v. 8 |
| redaktu | forviŝu | 500 | General note | N | N | a | Noto | Originala titolo: Alice in Wonderland |
| redaktu | forviŝu | 700 | Added entry--personal name | Y | N | a | Aŭtoro | Broadribb, Donald |
| redaktu | forviŝu | 700 | Added entry--personal name | Y | N | a | Aŭtoro | Tenniel, John |

Ni iras poste al *Bibliografia informo* kaj vidas la rikordon ĝisdatigita.


## ***Ekzemplera informo***






Kion ni faris ĝis nun estas simple krei la bibliografian rikordon kiu identigas la katalogatan verkon. Mankas aldoni la informon pri la ekzemplero(j) disponebla(j) en nia biblioteko. Ni supozu, ke ni havas du ekzemplerojn de ĉi eldono, el kiuj unu damaĝita. Ni klakas sur *Aldonu ekzempleron* en unu el la du eblecoj (en la maldekstra menuo aŭ en la rikordo mem) kaj aperas jena formularo:





La barkoda numero povas esti aŭtomate generita aŭ sisteme kreita de la bibliotekisto. Kvankam ni metos ekzemplojn de ambaŭ, ni konsilas ĉi lastan manieron ĉar la sistemo ne havas multajn serĉeblecojn kaj per la barkodo – traserĉebla- ni povas doni pliajn interesajn informojn pri ĉiu ekzemplero kaj plifaciligi la trovon per la datumoj notitaj en ĝi. La barkodo povas esti kreita per kombino de numeroj kaj literoj kaj ĉiu biblioteko povas dezajni la strukturon plej konvenan al siaj bezonoj. Vidu sube, kiel ekzemplon, la barkodan strukturon uzatan de Biblioteko Juan Régulo Pérez.



Biblioteko Juan Régulo Pérez - Microsoft Internet Explorer
http://www.esperanto.es/openbiblio/catalog/biblio_copy_new_form.php?bibid=3258&reset=Y
Biblioteko Juan Régulo Pérez
Ĉefpaĝo
Pruntejo
Katalogejo
Administrejo
Raportoj
Elsalutu
Serĉu denove
Bibliografia informo
Redaktu bazan bibliografian informon
Redaktu MARC-informon
» Aldonu ekzempleron
Rezervo peto
Forviŝu
Kopiu ĉi rikordon
Nova rikordo
Alŝutu MARC-datumojn
help
Kampoj markitaj per * estas devigaj.
Aldonu ekzempleron:
* Barkoda numero:
Aŭtomata generado
Priskribo:
Kun subskribo de la tradukinto
Akceptu
Nuligu
Retkatalogo (OPAC) | Helpo
powered by OpenBiblio a free library system
Realigita per OpenBiblio - versio: 0.6.0 Versio de datumbazo 0.6.0
Kopirajto © 2002-2005 Dave Stevens
licence de GNU General Public License
Listo
Internet
Inicio
21:58



Biblioteko Juan Régulo Pérez - Microsoft Internet Explorer
http://www.esperanto.es/openbiblio/shared/biblio_view.php?bibid=3258&msg=Ekzemplera+informo+sukcese+kreita.
Biblioteko Juan Régulo Pérez
Ĉefpaĝo
Pruntejo
Katalogejo
Administrejo
Raportoj
Elsalutu
Serĉu denove
» Bibliografia informo
Redaktu bazan bibliografian informon
Redaktu MARC-informon
Aldonu ekzempleron
Rezervo peto
Forviŝu
Kopiu ĉi rikordon
Nova rikordo
Alŝutu MARC-datumojn
help
Ekzemplera informo sukcese kreita.
Baza bibliografia informo:
Speco: libro
Kolekto: HEF
Signaturo: 9876
Titolo: Alico en Mirlando
Titol-aldono:
Aŭtoro: Carroll, Lewis
Verkinto(j): Lewis Carroll ; tradukis el la angla lingvo Donald Broadribb ; [internaj bildoj de John Tenniel]
Montru ĉe retkatalogo (OPAC): jes
Aldonu ekzempleron
Ekzemplera informo:
Funkcio Barkodo Priskribo Stato Stato-dato Redonenda
redaktu forviŝu 032581 Kun subskribo de la tradukinto Disponebla 2010-09-14 15:58:42
Aldona bibliografia informo:
Fakvorto: Infanlibroj tradukitaj
Eldono: 3a eld.
Eldonloko: Kaliningrado
Eldoninto: Sezonoj
Eldondato: 2004
Priskribo (Amplekso, paĝoj...): 80 p.
Priskribo (Aliaj detaloj): il.
Priskribo (Mezuroj): 20 cm
Serio: Mondliteraturo
Volumo / numero: v. 8
Noto: Originala titolo: Alice in Wonderland
Aŭtoro: Broadribb, Donald
Aŭtoro: Tenniel, John
Retkatalogo (OPAC) | Helpo
Internet
Inicio
21:59


Biblioteko Juan Régulo Pérez - Microsoft Internet Explorer
http://www.esperanto.es/openbiblio/catalog/biblio_copy_new_form.php?bibid=3258&reset=Y
Biblioteko Juan Régulo Pérez
Ĉefpaĝo
Pruntejo
Katalogejo
Administrejo
Raportoj
Elsalutu
Serĉu denove
Bibliografia informo
Redaktu bazan bibliografian informon
Redaktu MARC-informon
» Aldonu ekzempleron
Rezervo peto
Forviŝu
Kopiu ĉi rikordon
Nova rikordo
Alŝutu MARC-datumojn
help
Kampoj markitaj per * estas devigaj.
Aldonu ekzempleron:
* Barkoda numero: lbx2010hef009876mp
Aŭtomata generado
Priskribo: Kovrilo difektita
Akceptu
Nuligu
Retkatalogo (OPAC) | Helpo
Realigita per OpenBiblio - versio: 0.6.0 Versio de datumbazo 0.6.0
Kopirajto © 2002-2005 Dave Stevens
licence de GNU General Public License


Biblioteko Juan Régulo Pérez - Microsoft Internet Explorer
http://www.esperanto.es/openbiblio/shared/biblio_view.php?bibid=3258&msg=Ekzemplera+informo+sukcese+kreita.
Biblioteko Juan Régulo Pérez
Ĉefpaĝo
Pruntejo
Katalogejo
Administrejo
Raportoj
Elsalutu
Ekzemplera informo sukcese kreita.
Baza bibliografia informo:
Speco: libro
Kolekto: HEF
Signaturo: 9876
Titolo: Alico en Mirlando
Titol-aldono:
Aŭtoro: Carroll, Lewis
Verkinto(j): Lewis Carroll ; tradukis el la angla lingvo Donald Broadribb ; [internaj bildoj de John Tenniel]
Montru ĉe retkatalogo (OPAC): jes
Aldonu ekzempleron
Ekzemplera informo:
Funkcio | Barkodo | Priskribo | Stato | Stato-dato | Redonenda
redaktu forviŝu | 032581 | Kun subskribo de la tradukinto | Disponebla | 2010-09-14 15:58:42
redaktu forviŝu | lbx2010hef009876mp | Kovrilo difektita | Disponebla | 2010-09-14 16:00:53
Aldona bibliografia informo:
Fakvorto: Infanlibroj tradukitaj
Eldono: 3a eld.
Eldonloko: Kaliningrado
Eldoninto: Sezonoj
Eldondato: 2004
Priskribo (Amplekso, paĝoj...): 80 p.
Priskribo (Aliaj detaloj): il.
Priskribo (Mezuroj): 20 cm
Serio: Mondliteraturo
Volumo / numero: v. 8
Noto: Originala titolo: Alice in Wonderland
Aŭtoro: Broadribb, Donald
Aŭtoro: Tenniel, John

Ĉar la lasta ekzemplero aldonita havas difektitan kovrilon, ni decidas ke ĝi ne prunteblas. Endas do ŝanĝi la informon aperintan en *Stato* ĉar la ekzemplero ne disponeblas por pruntado. Ni klakas sur *Redaktu* kaj elektas el la listo de eblaj statoj, tiun kiun ni deziras:






Se ni bezonas forviŝi iun rikordon unue endas forviŝi la informojn pri ekzempleroj kaj nur poste, klakante sur *Forviŝu* en la maldekstra menuo forviŝi la rikordon.

## Barkodo

La barkodo (informo pri la ekzemplero) starigas rilaton inter ekzemplero de iu verko kaj la bibliografia rikordo. Ĉar enhavas informon pri unu difinita ekzemplero ĝi do devas esti unika. Ĉiu biblioteko kreu la strukturon de la barkodo laŭ siaj propraj bezonoj. Jen, kiel ekzemplo, la ĝenerala barkoda strukturo de Biblioteko Juan Régulo Pérez:

lbx1970hef002514mf

Ĝi permesas:
lb → Identigi la dokument-specon en serĉebla kampo. (Ni kreis apartan kodon por ĉiu speco, vidu sube).
x1970 → Koni la alven-daton de tiu dokumento al la biblioteko. (Se ni ne konas tiun daton, en la barkodo aperas 0000)

hef → Scii ĉu la dokumento apartenas al la kolekto de HEF aŭ al tiu de MEL (Madrida Esperanto-Liceo), kiu fizike troviĝas en la sama ejo.
002541 → Koni la signaturon de la dokumento.
mf → Koni la donacinton de la dokumento. (Se ni ne konas la donacinton, en la barkodo aperas yy)

Se temas pri plurvoluma verko:

lbx1970hef**2514v1**mf
lbx1970hef**2515v2**mf

Se temas pri fakta bindaĵo, t.e., kolekto de libroj kunbinditaj de iama posedanto sen eldoninta interrilato, la strukturo jenas:

lb**f1**x1970hef00**2514**mf
lb**f2**x1970hef00**2514**mf
lb**f3**x1970hef00**2514**mf

f1, f2 kaj f3 signifas, respektive, unua, dua kaj tria verko de la kunbindaĵo. Ĉiu verko havos sian propran bibliografian rikordon. Rimarku ke, ĉar temas pri nur unu fizika volumo, ili havas la saman signaturon, tiun de la kunbindaĵo.

Por revuoj kaj aliaj dokumentoj ne sinsekve enbretigitaj sed enskatole stokitaj, la strukturo ŝanĝiĝas iomete. Ekzemple:

Revuoj: rvx**1991**hef**RVsk1** → 1991 (jarkolekto); RVsk1 (skatolo1 de revuoj). En la kampo "Priskribo" de "Ekzemplera informo" eblas indiki ĉu la jarkolekto estas kompleta aŭ ne. Alia ebleco: rvx**19911996**hef**RVsk3** (jarkolektoj inter 1991 kaj 1996 en skatolo 3 de revuoj)

Turismaj broŝuroj: tbx2010hef**0001TBsk1** → 0001 (ordonumero en la skatolo); TBsk1 (skatolo 1 de turismaj broŝuroj).

Listo de kodoj uzitaj de Biblioteko Juan Régulo Pérez:

| | |
|---|---|
| Libro | lb |
| Revuo | rv |
| Sonregistro | sr |
| Video | vd |
| Elektronika rimedo | er |
| Mapo | mp |
| Turisma broŝuro | tb |
| Partituro | pt |

## *Utilaj ligiloj*

OpenBiblio:
http://obiblio.sourceforge.net/
http://www.ub.edu/bid/19russo.htm
MARC-Formato: http://www.loc.gov/marc/marc.html

FEDERACIÓN ESPAÑOLA DE ESPERANTO

Ana Manero
Biblioteko Juan Régulo
Hispana Esperanto-Federacio
http://www.esperanto.es/biblioteko
biblioteko@esperanto.es

*Versio: 2011*